

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD

mardon, la 5-an de Julio, 2011 • numero kvar

## Venontaj eventoj

### Mardo (hodiaŭ)

★ 9:00 - 11:30 atm: Lecionoj

★ 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj

★ 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo: prezento de Lottie ERICSON



### Merkredo (morgaŭ)

★ **Ekskurso-tago:** Libera tago por longaj ekskursoj. Kompreneble, vi rajtas vagi laŭvole – aŭ sole aŭ grupe. Por tiuj, kiuj volas ĉiĉeronon, Hoss gvidos grupon al la urbocentro de La Jolla.

### Ĵaŭdo

★ 9:00 - 11:30 atm: Lecionoj

★ 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj

★ 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo: prezento de Vicky CRICKETT

### Vendredo

★ 9:00 atm - 12:30 ptm: Lecionoj

★ 2:00 - 5:00 ptm: Ekskursoj

★ 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo: Vizito de profesoro Orlando RAOLA, prezidanto de Esperanto-USA

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Cuzco 117  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sur la pordo de nia komuna ĉambro en Cuzco.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en Cuzco 117, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Pri la ekskursotago (morgaŭ)

Morgaŭ (merkredo) estos libera tago, por ke vi havu la tutan tempon por ekskursi, esplori, aŭ “umi” laŭvole.

Por tiuj, kiuj volas ĉiĉeronon, Hoss gvidos grupon je 9:30 atm al bushaltejo de kie oni povas trafi busojn al diversaj lokoj. De tie lia grupo veturos al la centro de La Jolla, urbeto proksimume 40 minutojn for de UCSD. La grupo promenos al la golfeto La Jolla Cove – belega parko kun plaĝo, kavernoj, birdoj kaj marleonoj. Poste oni povos butikumi, vagi tra la luksa urbo, aŭ manĝi ĉe apudmaraj restoracioj.

Tamen: ne sentu vin devigata sekvi la grupon! La regiono ĉirkaŭ ni havas multajn vidindaĵojn – tro multajn por listigi ĉi tie, kaj vi kompreneble rajtas vagi laŭvole. Jen kelkaj ideoj:

● la histori plena kvartalo de Sandiego, kiu nun nomiĝas la “malnova urbo” (*Old Town*)

● la ŝika kvartalo *Gaslamp* kun multaj butikoj kaj restoracioj

● la haveno *Embarcadero* kun imponaj militŝipoj kaj velŝipoj

● la stadiono *Qualcomm* kie oni povas spekti piedpilkon, basbalon, ktp.

● la parko *Balboa* kun ties abundaj verdaĵoj, antropologia muzeo kaj mondfama bestoĝardeno

● la parko *Torrey Pines* kiu situas norde de la kampuso kaj atingeblas per buso #101. Ĝi prezentas belan arbaron kaj salakvan marĉon por esplori.

● la plaĝo *Black's Beach*, atingebla per kruta ŝtuparo apud la glisilejo

● la multaj plaĝoj en Sandiego: *Mission Beach, Ocean Beach, Pacific Beach, Windansea Beach*, ktp.



Marleonoj kutime sunbaniĝas sur la rokoj en la golfeto La Jolla Cove.

## Leteroj

Kara Redaktoro,

Malgraŭ tio, ke via (nia) ĵurnalo estas tre bona, kun interesaj kaj helpemaj artikoloj, mi volas mencii eblan eraron en numero unu de *La NASKa Fasko* por 2011.


Vi verkis “Serĉu min, la ulon kiu portas ridindan ĉapelon.”

Ĉu tio estu: “Serĉu min, la ulon kiu portas ĉarman, belan ĉapelon?”

Amike, Filipino

[Dankon, Filipino. Tamen se mi estus tion dirinta, neniu estus min trovinta... – Red.]

### Senintenca esperantaĵo?



Trovita ne malproksime de nia loĝejo. La konstruaĵo iam solís (ĉu ĝi estis la unua?) sed evidente ne plu solas...

## Omar la orama omaro

De Vido GILLET

Ekde la komenco, estis inter la homaro iom da rakontistoj, kiuj rakontadis siajn rakontojn pri strangaj, eble magiaj, bestoj. Eĉ hodiaŭ, kiam ni kunsidas ĉirkaŭ fajro je somera vespero, oni nepre petas aŭdi pri la tri ursoj aŭ porketoj, la alkego blua, aŭ aliaj tiel.

Kompreneble, ĉiu havas sian plej ŝatatan rakonton. La mia estas la rakonto pri Omar la Orama Omaro. Neniam vi aŭdis ĝin? Ĉu vere?

Omar estis, supozeble, omaro. Li havis, kiel kutime, kirasan felon kaj du ungegojn, du etan okulojn, kaj grandan fortan voston.

Omar loĝis en maro, malprofunda kaj varma. Li estis sufiĉe kontenta ĝis li trovis la perditan trezoron de iu pirato. Estis multaj moneroj, brilaj kaj flavaj, kiuj tintis feliĉe tuŝadanta, kaj Omar sentis sin kiel ebrulo.

Li dancis kaj volvis en la brileco. Li kantadis laŭ la sono. Li festadis tra la tago kaj la nokto.

Finfine, Omar eksciis sian malsaton kaj sian malvarmecon. Tiel multe da oro neniam ŝparis tiun piraton, kaj ĝi nek nutris nek varmigis Omar-on. Li eklernis ke Oro povas esti amuza ludilo, sed aĉa amato. Ekde tiam, ĝis hodiaŭ, Omar la Omaro ne plu estas Orama.

## Manpremi kaj brakumi

De Maria MURPHY

Ĉu vi iam bedaŭras ke vi ne plu povas renkonti, manpremi kaj brakumi d-ron Zamenhof kaj aliajn famajn veteranojn de la Esperanta movado?

Sed nun vi havas okazon renkonti, manpremi, kaj brakumi veteranojn de la jaroj “50-aj”: Maria de Florido kiu manpremis kaj brakumis interalie Julio BAGHY, Andreo CSEH, Ivo LAPENNA kaj aliaj...

## Kiu loĝas kie?

### Asante 122

Koto FARMER  
Dianne CARTER  
Lori SINGER  
Sarah SULTAN

### Asante 124

Vido GILLET  
Brian BENNETT  
Javier FONSECA  
Joseph DIAZ

### Asante 125

John BENTLEY  
Thomas RUSCH  
Ray REDD  
Bill MANIA

### Asante 126

Christine COOK  
Vicky CRICKETT  
Maria MURPHY

### Asante 127

Phil DORCAS  
Elizabeth DORCAS

### Cuzco 116

Ellen EDDY  
Charlotte ERICSON  
Ana VELITCHKOVA

### Cuzco 117

Lee MILLER  
Hoss FIROOZNA  
Bob RUSSELL  
Yoŝiki KOMORI

### Cuzco 118

Bertilo WENNERGREN  
Birke DOCKHORN

### Cuzco 211

Michael KUIJN  
Alibek DANYALOV  
Chad FISHER  
Kinen CARVALA